



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencej

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 55

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 januaro 1924

LA PROBLEM PRI INTERNACIA LINGVO.

La bone konata al la bulgaraj esperantistoj S-ro Henriko Fiŝer el Bukureŝto, dum la Rusĉuka kongreso rakontis interalie la sekvantan sprian historieton:

En Jugoslavio grupeto da junaj reesperantistoj veturis ekskurse per vagonaro. Ili gaje babiladis inter si en esperanto. En la sama vagono veturis simpla serba vilaĝano, kiu kun intereso aŭskultis ilian paroladon kaj fine demandis:

— En kia lingvo vi parolas? Ĉu en itala?

— Ne, avo, ni parolas en esperanto.

— Esperanto? Kia do estas tiu lingvo?

— Tio estas lingvo facila, kiun povas ellerni ĉiu homo, ankaŭ la ne tre multe instruitaj. Ĝi estas destinita por servi al la homoj, kiam ili rilatas kun homoj el aliaj nacioj, kies lingvon ili ne komprenas.

— Eh, dankon al Dio! interjekciis la maljunulo kaj signis krucon. — Mi disvivis fine aŭdi ankaŭ tion.

La kompanio kun intereso observis la miron de la maljuna simpla vilaĝano. Post paŭzo li daŭrigis:

— Ĉu vi scias, ke mi ofte pensis pri tia afero, ke ekzistu tia lingvo, en tiu la homoj de diversaj nacioj povas interkompreniĝi?

Ha! Jen al vi okazo! Nun la kompanio estis vere mirigita. Liebnitz, Comenius, kaj tiom da pensuloj en la pasinteco ĝis niaj tempoj venis nature al tiu penso—tio ja estas facile komprenebla, ĉar ili havis tre vastan intelektan vivon kaj sentis la internaciecon de tiu vivo kaj la baron, kiun kaŭzas al ĝi la multlingveco. Sed tiu ĉi simpla kamparano? Per kiu vojo li trafis tiun ĉi problemon?

— Kio do donis al vi kaŭzon pensi pri tia lingvo? demandis unu el la junaj ekskursantoj, ne sen ŝercemo en la voĉo.

La maljunulo rakontis jenon:

— Mi estas malgranda vaganta komercisto kaj vizitas konstante vilaĝajn foirojn en Jugoslavio, en Bulgario, en Rumanio, en Hungario, en Aŭstrio . . . eĉ ĝis Saloniko mi estas irinta. Mi iras ĉiam kun mia malgranda azeneto, kiu portas mian komercaĵon. Ĉie, kie mi estis, mi trovis homojn, kies lingvon mi ne komprenis kaj kiuj min ne komprenis. Sed mi rimarkis ĉiam, ke mia azenojn, renkontante fremdlandajn azenojn tuj ekflaras ilin kaj komencas ian interparolon kun ili. Ĝi povas interkompreniĝi kun ĉiuj azenoj en ĉiuj landoj. Kaj en mian kapon venis do la penso, ke ni, la homoj, kiuj inter fremduloj ne povas interkompreniĝi per homa parolo, ni estas pli grandaj azenoj ol la azenoj!

—el Bulgara Esperantisto.

A.R.R.L. ENDORSES ESPERANTO and Recommends the Language to Its Membership.

After a two years' survey of the international language situation the American Radio Relay League, with certain qualifications, has decided in favor of Esperanto as its official international auxiliary language, this action having been taken by the A.R.R.L. board of directors at their annual meeting recently.

This decision was made on the ground that Esperanto is easily the chief of the auxiliary languages and has by far the greatest number of followers, with hundreds of thousands of users. Not wishing to enter upon the subject unadvisedly, the League first communicated with all of the national amateur radio societies of the world and all of these which expressed an opinion in favour of any artificial language recommended Esperanto.

Interest in an international language developed rapidly among members of the A.R.R.L., following the successful communications in radio telegraph code between transmitting amateurs in the United States and Canada and those in many foreign countries. The necessity for the endorsement of an auxiliary language has become particularly apparent as a result of the increasing interest of amateurs in international communication during the past year.

There is every reason to suppose, the A.R.R.L. believes, that radio communication in code between the private citizens of one country and those of another will become even more popular the coming winter, making the use of an auxiliary language by the amateur radio operators of the world almost imperative. Esperanto societies exist in most of the large cities, it was pointed out, and the language may be learned in a very short time.

In presenting Esperanto to its members the directors of the American Radio Relay League, issued a statement of which the following is a part:

"In thus adopting and recommending Esperanto, the American Radio Relay League wishes it to be understood clearly that it does not regard that language in its present form as necessarily the one which should come

unchanged into world-wide recognition, and that it stands ready to adopt such modification of Esperanto whatever other language may eventually be agreed upon by an authorized international agency of great nations of the world. We believe that it is essential to the eventual success of an international language that some language of this kind become a world-wide working vehicle of expression, after which authorized agencies can make such rectifications as may then seem desirable. We believe that our members can accept Esperanto in the expectation that it will be one of the factors taken into account in the formation of an eventual I.A.L., if indeed the chief support thereof.

"Esperanto's dominating position in the field, however, its position as a leader of the movement, and more particularly the fact that it is already in actual use by a number of people many times larger than other projects combined, have caused us to lend our endorsement to it. To do otherwise at this stage would only retard the ultimate success of the whole movement, regardless of the merits of the others.

"It is apparent to us that it is nothing short of destructive to the success of the whole movement if the advocates of an international language to split into camps and attempt to shout the merits of the particular project and to decry the language of the other. The time will come when changes and improvements can be made—when an international tribunal assumes charge. Meanwhile controversies can only delay the attainment of the object."

KRONIKO.

Hobart Esperantists were interested in the initial attempt to broadcast an Esperanto message from station 3L.O. Several members gathered at the house of a local wireless operator who kindly arranged to "listen in," but unfortunately owing to very bad weather conditions it was impossible to hear anything clearly. It is hoped however to arrange "listen in" on future occasions when conditions will probably be more favourable.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata sinjoro,

En la vastaj ŝtatoj de Aŭstralio, Kvinslando kaj Okcidenta Aŭstralio, troviĝas bienoj aŭ brutbredejoj, kies amplekso ofte atingas milojn da kvadrataj mejloj. Estas neeble provizi tiajn bienegojn kun limbariloj, tial la kelkmiloj da brutoj, precipe bovoj nutras sin tute libere, kaj nur malofte vidas la homojn, kaj pro tio fariĝas preskaŭ sovaĝaj.

Ĉiu jare oni devas kolekti lā brutaron por brulmarki la idojn, ĉar en Aŭstralio la bruto sen brulmarko apartenas al kiu ajn povas kapti ĝin, ankaŭ la tuta brutaro estas devigata tranagiĝi banon en kio oni metas venenon, por mortigi la bestetojn, kiuj turmentas la brutojn.

Kolekti la brutojn en kampon ĉirkaŭita de barilo, estas malfacila afero, kaj estas necese, ke ambaŭ la viroj kaj la ĉevaloj, kiuj portas ilin, estu spertaj. Jene brutisto priskribas siajn spertojn.

— Ni jam fin kolektis la brutaron ĉe nia brutbredejo, kiam oni sciigis nin, ke oni bezonas rajdistojn ĉe Savanna brutbredejo. Nu, Savannaj brutoj estas konataj, kiel la plej sovaĝaj el tiuj de la brutoj, kiuj troviĝas en Kvinslando, kaj eble en la tutmondo.

— Ĉar mi estas juna, kaj amas la aventuron, tre kontentigis min, ke mi estis elektita por iri al Savanna. Kune kun sep aliaj brutistoj mi komencis la rajdodon al Savanna, je 75 mejla distanco. Sep ŝargĉevaloj portis la provizon, kaj krome estis tri bonaj ĉevaloj por ĉiu el la brutistoj, entute 31 ĉevalojn. La unuan tagon ni rajdatingis la elektitan kamplok, kaj starigis la tenetojn. La sekvantan matenon antaŭ la sepa horo, ni jam matenmanĝis, kaj estis preta komenci la laboron por tiu tago. La administranto persone estris la aferon, sed kompreneble ĉiu el la brutistoj estis spertulo, ĉiu bone scias kion fari.

— La ĉevaloj, krom tiuj, kiujn ni rajdis estis piedigitaj, kaj lasitaj ĉe la kamploko; kaj silente ni forrajdis unuope kun interspaco de dudekjardoj inter ni. Eĉ unu vorto parolita sufiĉe laŭte, por ke la plej proksima viro povu aŭdi, eble timigus la brutojn, kaj forkurigus ilin antaŭ ol ni povus vidi ilin. Post iom da tempo unu el la brutistoj fajfis, kaj ni ĉiuj haltis. La signifo estis, ke li jam vidis la bovojn. Preskaŭ je la sama momento la bovoj vidis nin. Tuj ili forkuris, kaj ni galope persekutis ilin, ĉiam je la distanco de dudekjardoj inter ni.

— Unue nia celo estis malhelpi ilin eniri la arbaregon, kiu etendiĝis por mejloj, kaj due ĉirkaŭrajdi kaj haltigi ilin. Ili kuregis al la arbarego, kaj jam atingis ĝin, antaŭ ol ni povis tion malhelpi, kaj ni devis premsekvi ilin; kompreneble mankas vojejoj en la arbarego, krom tiuj faritaj de la brutoj. Ni rajdis kuŝante tiel malaltaj, kiel eble sur la ŝultroj de la ĉevaloj, por eviti la danĝeron, esti elseligitaj de la pendantaj branĉoj. Post eble cent jardoj ni atingis preskaŭ senarban spacon, kaj esperis, ke eble ni tie povus ĉirkaŭrajdi la brutojn, sed ni malsukcesis, kaj denove ili forkuregis, por pli ol unu mejlo tra la arbarego, kaj tiam atingis denove senarban lokon. La brutistoj nun sin lokis, por ke ili povu kurigi la brutojn en cirklo ĝis ili iom laciĝas, kaj fariĝas iom malpli kuremaj.

— Ni jam sukcesis haltigi ilin, kiam juna virbovo forkuregis al la arbarego, la plej proksima brutisto sekvis lin, kaj baldaŭ elvidiĝis inter la arboj, la aliaj brutistoj haltigis siajn ĉevalojn kaj penis malhelpi la forkuron de la aliaj brutoj. Tiam alia bovo forkuregis, kaj alia, kaj alia, entute kvar, ĉiu sekvita de brutisto. Tiam ankoraŭ du bovoj forkuregis, sed tiuj ne estis sekvataj, ĉar la regulo estas, ke neniam restas malpli ol kvar brutistoj kun la aro. Estis mia devo persekuti la kvaran

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

forkurantan bovon, kaj galope mi penis revenigi ĝin, sed ne sukcesis, tial mi devis faligi kaj ligi ĝin. Post longa sperto rajdisto povas faligi bovon, dum li ankoraŭ sidas sur la ĉevalo, kaj estas facile, kiam oni ellernis la ruzon. La rajdisto kaptas per la mano la voston de la bovo, kaj je la preciza momento flanken ek-tiras la voston, kaj tiu faligas la bruton. Oni tiam elseliĝas rapide, kaj ekprenas la postkruron de la falinta bovo, alten tenas ĝin, kaj la bovo ne povas stariĝi, kaj per la rimeno, kiun oni portas por tia okazo oni kunligas la postkrurojn, kaj la bovo restos tie, ĝis oni denove revenos al ĝi.

— Ĉar mi ne ankoraŭ ellernis la supre priskribitan ruzon, mi agis laŭ pli simpla metodo, mi persekutis la bovon, ĝis ĝi iom laciĝis, kaj komencis plimalrapide kuri, tiam mi elseliĝis, kaj kuratingis kaj kaptis ĝin je la vosto, faligis kaj ligis ĝin, kaj revenis al la aliaj.

— 'Tom,' diris la administranto, 'konduku nin al kie vi faligis la bovon. Tom malrapide rajdis antaŭen al kie la bovo kuŝis, kaj ni pelis antaŭ ni la bovaron, kun interspaco de dekkvin jardoj malantaŭ li, kiam li alvenis ĉe la loko, li elseliĝis kaj unue forfrapis la kornojn de la bovo, tio dolorigas la bovon dum iom da tempo, sed estas necese por malpli danĝerigi ĝin. Tion farinte, Tom rapide malligis la rimenon, kaj surseliĝis. La bovo tuj stariĝis, kaj alkuregis la ĉevalon de Tom. Nun, nekredeble, kiel ŝajne estas, al homoj kiuj loĝas en la urboj, nek Tom nek la ĉevalo cedis. La ĉevalo facilmovas, kiel kato sin turnis iomete, kaj lasis la bovon frapi lin, ne rekte kun la kapo, ĉar tio certe faligus lin, sed ricevis la frapon flanko kontraŭ flanko. Tiam la sperto de la ĉevaloj montriĝis. Ĝi komencis (helpita de alia rajdisto, kaj ĉevalo) puŝi la bovon antaŭen en la direkton de la bovaro, tiel puŝata de la du ĉevaloj (kiuj mem

scias kion fari, sen la gvidado de rajdistoj) la bovo baldaŭ lokigis sin la bovaro, kaj tiam ni faris same, la aliaj, kiuj estis faligitaj kaj ligitaj.

— Kiam la bovaro estis sub kontrolo, ri pelis ilin, ĝis kie troviĝis ĉirkaŭbarilo, kies amplekso estas unu kvadrata mejlo, kie ili devis resti, ĝis la kolektiĝo finiĝis. Ni daŭrigis tiam laboron dum preskaŭ unu monato, kaj tiam kolektiĝis pli ol ses cent bovojn, la laboro brulmarki la idojn kaj tiujn plenaĝajn bovojn, kiuj troviĝis sen brulmarko, komencis. Ni apartigis ilin en diversajn brutejojn kaj tio estas malfacila kaj danĝera laboro. Mia posteno estis en la apartigojeto, kaj mia devo estis peli bovojn antaŭen, kaj devigi ilin iri tra mallarĝa pordego. Subite virbovo kun larĝaj kaj tre pinthavaj kornoj ekkuregis kaj atakis min, mi ekkuris al la palisaro, sen perdo de tempo, sed antaŭ ol mi povis altigi min, la tero li jam atingis min. Kiam brua frapo liaj larĝaj kornoj frapis la palisojn ambaŭflanke de mia korno. Se la kornoj maltrafis la palisojn, lia kapo certe estus frapinta min, la tiu ĉi historieto restus neskribita sed okazis, ke mi povis grimpi sendanĝera loko el inter ĝiaj ĉirkaŭantaj kornoj; mi estis tute nevundita, sed mi estis pliproksima al la morto, ol estas komforta.

Devigi la lastajn du aŭ tri bovojn iri tra la pordego, estas ĉiam la plej malfacila laboro. La viro, kiu devas fari tion, devas uzi diversajn ruzojn. Unu metodo estas kaŭri proksime al la pordego, kaj ĵeti pecojn da tero la bovo, samtempe farante strangan bruojn, por inciti la bovon ekkuri je li, tiam li rapide eliras tra la pordego, kaj la bovo sekvas lin. Li estas la bovon, kaj pro ĝia rapideco bovo jam trairis la pordegon, antaŭ ol ĝi povis sin halti, kaj la pordego estas fermita post ĝi. Okazis unu tagon, ke estis mia devo fari tian laboron. Ĉio fariĝis bona escepte

GLUMARKOJ for your correspondence. GLUMARKOJ

A new and original design in two colours. Distinctly Australian.
SIXPENCE PER PACKET OF 25.

The entire proceeds will be donated to the fund of the 5th Australasian Congress, Easter, 1925, Melbourne.

Secure your ticket for the congress early: Hon. Librarian, Melbourne Esperanto Society, Box 731, P.O., Elizabeth Street.

por la fakto, ke staris malantaŭ mi alia bovo, kiu laŭ mia kalkulo restos kviete dum iom da tempo; sed mi zraris. Tuj ĝi atakis min, kaj trapuŝis ĝiajn kornojn tra miaj vestoj, kaj portis min ĉirkaŭ la brutejo, por eble dudek jardoj. Subite kaj neaten-dite, ĝi lasis min fali, kaj la bovo mem falis. Ĝi estis malsana bovo, kiu baldaŭ poste mortis. Oni opiniis, ke dum ĝi naĝis tra la bano, preparita por mortigi la bestetojn, ĝi trinkis iom da veneno, kaj tio estis sufiĉe venena por mortigi ĝin.

Via fidele, P.H.

THE FIFTH AUSTRALIAN CONGRESS—EASTER, 1925.

Thanks to the active co-operation of our samideanoj, the forthcoming congress promises to be successful and encouraging to all who are working for the adoption of Esperanto as the officially recognised international auxiliary language.

All esperantists and sympathisers with the movement are entitled to take part in the congress.

It is earnestly hoped that every esperantist, whether belonging to a group or not—will at once notify the Hon. Sec. that they wish to take part in the deliberations of the congress. the excursions, and festivities that will form part of the programme.

It is desired to bring home to the educational authorities, the government and public generally, the urgent need for teaching esperanto in all state and other schools.

While in other countries school children are being taught to read, write and speak the international language, we in Australia are neglecting this obvious necessity—in-cidentally penalising the future business men and women of our land—and are holding back that much needed mutual comprehension and understanding which makes for peace and goodwill.

The Congress fees are:—Melbourne 21/-, country and interstate 10/6. Send your application, together with the fee, to the Hon. Sec., R. R. Rawson, 212 Swanston St., Melbourne.

Students who desire to sit for examination during the congress will please notify the hon. sec.

HUMORO.

Skota ŝparemo.

La skotaj havas reputacion pri ŝparemo.

Skotaj novgeedzoj planis festi la mielmonaton en Paris kaj veturi tien per aeroplano de Londono. Ili iris al la stacio ĉe Croydon, kaj la edzo demandis pri la kosto de la vojaĝo. La respondo estis: ses gineoj.

— Ses gineoj! li ekkriis, ses gineoj por ambaŭ?

— Ne, oni rediris, ses gineoj por ĉiu.

Tre ĉagrenite ili foriris.

Aviadisto renkontis ilin kaj demandis, kial ili tiel malĝojas.

— Oni postulis dekdu gineojn por flugo al Paris; ses por mi kaj ses por Mario. Estas tro tro multe, do ni ne iros.

— Ho, diris la aviadisto, mi kondukos vin al Paris en mia aeroplano senpage, kondiĉe . . .

— Kondiĉe, kiel? interĵetis la skoto.

— Kondiĉe, ke vi pagu al mi unu funton por ĉiu fojo, kiam vi ekkrios "ho."

— Konsentite, tuj diris nia ŝparemo amiko, kaj tre baldaŭ poste li kaj lia edzino troviĝis en la aeroplano.

La aviadisto portis ilin tre alten super la nuboj, ili turniĝis supro mal-supren, glitiĝis, nodturniĝis kaj kirliĝis en ĉiu direkto. Neniu bruo de la pasaĝeroj, neniu "ho"! Fine ili alvenis en Paris, kaj la aviadisto elsaltis el la aeroplano tute surprizite pri la silento de la pasaĝeroj.

— Mi gratulas vin, li diris al la edzo, vi devas pagi neniom, ĉar vi ne diris "ho" eĉ unufoje.

— Sed mi preskaŭ diris ĝin kiam Mario elfalis, rediris la skoto.

Kaj la aviadisto enrigardante la kajuton rimarkis, ke la skoto estas sola.

Skoto vekiĝis iun matenon kaj konstatis, ke dum la nokto lia edzino mortis.

Kun larmoplenaj okuloj li iris al la supro de la ŝtuparo, kaj, kun voĉo tremanta pro emocio, kriis al la kuiristino!

— Manjo, Manjo, ... Nur unu ovon hodiaŭ matene, Manjo!

Sendis s-o P. en Edinburgh.

—El Revuo.

BECHE-DE-MER.

Beche-de-mer is not an attractive looking product. "Spade of the sea," as the French call it; trepang; sea-cucumber; it all goes the same way—to China, to fill the soup-plates of those who can afford the dainty. And apparently that number is not small, judging by the tons of the smoked and dried product that is sent away to the East. It is really a fish, of course—not a seaweed, as some people imagine. Some varieties of it lie hidden in the sand, others beneath the rocks, others just perambulate about. But it doesn't like cold water, and will not come out then. The trocas shell (Susu, the natives call it, because it resembles the humanfemale breast) is conical in shape, with spiral formation within. Its meat is good too—dried and cut into small pieces, the Chinese purchase it for the culinary artist to add to his shelves. And so, as the "seaman" later on bends over his big boiler, where the fish is being prepared for market, or feeds some mangrove wood into the fire over which the beche-de-mer is being smoked, he grins and says, "All got price; he give us chance for flour and calico for our family, and for something to pay that new church."

UNUA ESPERANTISTA FILATELEJO POLLANDO.

George Krzyzanowski, Lodz, Andrzej Str. 4 Vendado kaj interŝanĝado de poŝtmarkoj. Ni ofertas je tre malaltaj prezoj poŝtmarkoj de Pollando, Rusio, Sibirio, Kaŭkazio, Ukraino, Bolŝevio kaj Mezo-Litovio same kiel rimarkindajn variaĵojn.

Speciala Oficejo por interŝanĝado.

Kiu deziras interŝanĝi poŝtmarkojn sendu al ni—rekomendite, filatelista afranko—kajeron kun poŝtmarkoj de via lando maloftaj kaj eble valoraj uzitaj kaj novaj ĝis 100 ekz. de ĉiu speco, aldonante mankoliston de PM. Bazo Yvert, Michel, Zumsztejn 1924 aŭ 1925 kaj ni alsendos la deziran-tajn laŭ via mankolisto. Ne sendas unue. Provu kaj vi estos tre kontenta. Por bonaj p.m. ni donos special-aj ankaŭ bonaj kaj valoraj.

Nia oficejo estas juĝa registrita.

!! Respondo post 24 horoj !!

TREPANGO.

Trepango, (france: Beche-de-Mer ne estas belaspekta produktaĵo. "I fosilo de la maro," kiel la Franc ĝin nomas, trepango, mar kolkombr ĝi ĉiom iras la saman vojon—al ĉim jo, por plenigi la suptelerojn de tiu kiuj povas pagi por la bongustaj kaj ŝajne tiu nombro estas ne ma granda se oni prikalkulas la tunoj de la fumita kaj sekita produktaĵ kiuj estas forsenditaj al la Oriento Efektive, ĝi estas fiŝo, ne algo, ki iuj personoj opinias. Iuj specoj ku as kaŝitaj en la sablo, aliaj sub rokoj, ankoraŭ aliaj nur vage mov tas. Sed ĝi ne ŝatas malvarman al von, kaj ne aperigas sin kiam la ak estas en tiu stato. La "trocas" kon ko,) "susu," la indiĝenoj nomas ĝi ĉar ĝi estas tre simila al virina bru to, estas ronda je la bazo kaj intern volviĝas. Viandajo el ĝi estas bona: kiam sekita kaj tranĉita malgrandajn pecojn la Ĉinoj aĉet ĝin, por ke la elektema kuirsto hav provizon sur la bretoj. Tial dum fumigisto pli malfrue klinas sup sia granda kaldrono, kie la fiŝoj pr pariĝas por la vendejo, aŭ aldon manĝan lignon al la fajro sur k la trepango kuiriĝas, li ekridas k diras "Ĉio valoras al mi, ĝi eblig min aĉeti farunon kaj kalikoton p la familio kaj por doni iom por hel la konstruon de tiu nova (misia preĝejo." (El "La A.B.M. Misia Ru vu.")

THE DIVERSITY OF TONGUES

The Bible Society in Queen Victoria Street has a library of 15,000 volumes of one book—in 700 languages, of which 558 are living languages. What does it mean? The funny African tongues—do the matter? I think a learned Accadian or Babylonian, 2500 B.C., was very scornful one day about the notion that the Achaiusha—is my spelling right?—could have any contribution to make to learning or literature. He established his case triumphant and some generations later a man of that queer race wrote poems that are still read. You may know them, you know little if you don't; the "Iliad" and the "Odyssey" are quite good poems.—From The Daily News.

WHAT SHALL IT BE?

"French is already the international language," "English is rapidly becoming the international language." These and similar mutually destructive statements are often on the lips of the opponents of so-called "artificial" languages. Certainly, if there is any modern tongue that can be styled international in a general sense, it is French, but the scope of French is severely limited, and in various parts of the world the word French must be replaced by English (pidgin or otherwise), German, Arabic, Malay, Hindustani, Swahili, etc., etc.

Even a knowledge of eighteen languages did not enable a well-known Belgian linguist to address a cultured audience of Czechs in their own tongue, when he was recently on a visit to Prague. He was told that if he spoke in English he would get only a small audience, that if he spoke in French he might have a larger attendance at the lecture, but that French would not really meet the case, and in the end he had to speak in German, a tongue which, for racial and political reasons, no Czech listens to with pleasure, but which every educated Czech understands and which is the international language of that part of Europe. German may not be so difficult to learn as Czech, but it is by no means easy, and why should an Englishman, for instance, have to learn it just because he wants to converse or correspond freely with the folk in Czechoslovakia?—El International Language.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amikeco, 2, 3; Brazila Esperantisto, 5-8; Esperanto Triumfonta, 216 ĝis 218; France-Esperanto, 31; Inform-servo de la Internacia Labora Oficejo, 75, 76; La Unuigita Tutmondaro, novembro; La Suno Hispana, 89; Norvega Esperantisto, 3-4; Pola Esperantisto, 6-7; Revuo, 11; Sennacieca Revuo, 13-14; Sennaciulo, 6, 7, 8.

RECENZOJ.

LA SENDANGERECO DE FRANCUJO, unu el la problemoj de la paco. Andre Honnorat, Senatano, eks-ministro. Eldonaĵo de la Societo de la Historio de la Milito, Paris.

Ĉi tiu libro estas tradukitaj de 22 personoj, kies laboro estas trarigardita de s-ro Grosjean-Maupin. Pro tio oni povas konsideri la verkon kiel tre bonstilan.

La fakto, ke tiel grava eldonaĵo libro eldoniĝis Esperante estas ankoraŭ alia pruvo de la akceptado de nia lingvo. (C.W.B.)

TRI LIRIKOJ DE SHAKE-SPEARE, (1) Madrigalo, el "Measure for Measure," (2) Fidele, el "Cymbeline," (3) Carpe Diem, el "Twelfth Night." Muziko de Matthew Francis Coates, presbitero, M.A., Oxford, vortoj tradukitaj de Archibald John Ashley, presbitero; havebla de Pastro A. J. Ashley, Farnley Tyas, apud Huddersfield, Anglujo; prezo 1 ŝil. 6 p.

Jen io por la muzikemaj Esperantistoj. La muziko atingas altan nivelon. La tria kanto certe havos multajn kantistojn.

FIRST STEPS IN ESPERANTO, by Montagu C. Butler. Dua eldono, reviziita kaj pligrandigita.

La unua eldono estis en 1922 kaj nun, post nur du jaroj, ni havas duan eldonon, kies novaj partoj estas tiel grandaj, kiel la originala libro. La libro plene meritas ĉiujn laŭdojn kaj oni ne dubas ke la nuna eldono havos la saman koran akcepton, kiel la unuan. (C.W.B.)

GEORGE FOX. Fondinto de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj). Henry van Ettin. Friends' Council, 136 Bishopsgate St., London, 3d.

Mallonga biografio de Fox, kun ekstraktoj el liaj skriboj kaj klarigoj de liaj aspiroj. Eldonita je la okazo de la tria jarcento la la naskiĝo de Fox.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET, KEV.

JAVAJ LEGENDOJ KAJ FAB-LOJ, tradukis kaj reverkis Liem Tjong Hie kaj eldonita de la aŭtoro mem en Semarang- Java.

Sep Javajn rakontojn. Ĝis nun ne ekzistas en Esperanto ia libro koncernanta Javon, do, la nuna modesta verko estas bonvena.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 5 januaro ni ricevis la jenajn sumojn:—Marion Fraser, £3, donaco; A. Bennett, 4/6, oktobro '25; H. V. Tilbury, 4/6, junio '25; A. Wal-ford, 4/6, oktobro '25; H. E. Neville, 4/6, junio '25; Persista Grupo, 2/-, decembro '24; T. O'Leary, 4/6, novem-bro '25; W. Lamb, 4/6, aŭgusto '26; J. F. Hills, 4/6, aŭgusto '26; O. K. Sperling, 2/-, donaco; L. G. Glynn, 10/-, decembro '26; kontantaj, 5/-.

Sydney: Esperanto-Societo. Kun-venas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Ĝuste apud la ĉefsta-cidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Tay-lor; sekretario, S-ro L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburno Esperanto-Societo, Prezi-danto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Mel-bourne. Kunveno: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Brisbane Esperanto Club. Sekretar-io S-ro A. J. Sycamore, C/- Mr. W. Hartley, Carlton St., Highgate Hill, Sth. Brisbane. Address enquiries to Secretary, who may be seen between 12 noon and 1 p.m. at Murray Fraser Ltd., Charlotte St., City.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunve-nejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino I. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd. Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo. Prezidanto, S-ro Alfred Gregory; Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kun-veno: la legosalono de S-ro A. Gra-gory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ino J. Parker. Poŝta adreso, Warring- Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kan-garoo Rd., Oakleigh, marde vesper-e je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidantino S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leon-ard str., Victoria Park, W.A. Kun-venoj vespere je la oka horo. "Perth Academy," komencantoj me-krrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭd-

Persista Grupo, Armadale, Me-lburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kun-veno kaj poŝta adreso, 62 Northco-Rd., Armadale, merkrede vespere, la oka horo.

Raciista Esperanta kaj Disku-Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Sku-rie; sekretariino, fraŭlino B. Adam-son. Poŝta adreso, 673 Canning-str. North Carlton, Melbourne. Kunven-jo, Temperance Hall, Russell-str. Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kun-veno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vesper-e. Prezidantino F-ino C. M. Hannafor. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.